

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ

Aperas monate. Jara abono Kĉ 20.—, eksterlande Kĉ 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kĉ 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. —Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Frant. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso no. 169.352. — Telefono: 732/VI. — La manuskriptojn oni ne resendadas.

DR. STAN. KAMARYT:

LA AMO INTERNACIA.

Estas mirinde sed vere, ke, kvankam la nacieco ludas tiel gravan rolon dum estanteco, oni ne havas ĝis nun precizan sciencan difinon de ĝia esenco. Sed almenaŭ la ideon de la nacio ni povas difini: Ĝi estas komuno de la plej altaj havaĵoj de la vivo. La plej alta kaj la plej sankta komuno. Tial ĝi estas precipe komuna etika konscienco, la plej potenca kuntenilo de la etikaj fortoj. La ideo nacia bazas en la plej profundaj virtoj de la homa animo, ĝi realigas por la komuno la plej verajn sentojn de la vereco, humaneco kaj justeco. Tial la moraleco, kiu la sola suprenlevas la homon individuan, rezultas el la celoj de la nacio.

En la nacio ni sentas spite ĉio pli altan reciprokan spiritan kulturan komunon, eĉ se ĉiuj aliaj signoj de la naciaj ideo kaj konscio povas esti pritraktitaj kiel negravaj, la komuneco de la spirito estas malmalmankebla. Tiu ĉi spirita komuno estas ĉio, por kio batas komune nia koro kaj pri kio pensas komune nia kapo, kion komune kreas nia intelekto, ĉio, kion ni komune amas kaj malamas, por kio ni deziregas, por kio ni spirite vivas, ĉio, kio kreas nian spiritan havon filozofian, sciencan, literaturan kaj entute artan. Ni estu membro de ĉiu ajn nacio, ni taksas tiajn abstraktajn havaĵojn de nia nacio plej alte. Ĉiu ajn ni estu, ni volonte apostrofus nian nacion per vortoj de la angla poeto Oscar Wilde al sia patrujo: »Ho, Anglio, tera horizonto kuŝas apud viaj piedoj kaj en la mano vi haltas Teron kiel vitran globon!« La valoroj neimageblaj, niaj komunaj idealoj religiaj kaj moralaj, sociaj kaj socialaj, politikaj kaj juraj ŝajnas efektiveblaj en la ideo de la nacio.

Sed kvankam la idealoj de la diversaj nacioj havas la samajn nomojn, ili tamen estas diversaj. Certe ĉiu egale pie levas

la okulojn dirante la vortojn justeco, egaleco, frateco, religio, solidareco, sed la enhavo de tiuj noblaj ideoj diferencas iom ĉe la individuoj, multe ĉe la nacioj. Sed ĉiuj amas ilin egale, per la alten flamanta pasio. Ju pli primitiva estas la kulturo de la nacio, des pli malvasta estas enhavo de ĝiaj humanecaj idealoj, sed des pli ardege ĝi kredas, je ilia absoluta vereco, des pli pasie ĝi amas ilin kaj des pli kruele ĝi malamas tiujn, kiuj estimas aliajn Diojn. En historio de ĉiu nacio estis momento, kiam ĉiuj ĝiaj filoj povis ami ĝin sole malamante, malestimante, ofendante, kalumniante la ceterajn naciojn; kaj de la ceteraj plej multe la apudajn. Tiela amo de la nacio ne estas bona.

Kun la kresko de la nacia kulturo pli vastiĝas la enhavo de la humanecaj ideoj, kaj kvankam ili ricevas pluajn trajtojn tre specialajn, ili ricevas ankoraŭ pluajn trajtojn similajn kaj komunajn kun la idealoj de la aliaj nacioj. Kiam en la jaro 1877 komencis la Rusoj la sanktan liberigan militon kontraŭ Turkoj, neniu en Eŭropo povis kompreni, ke oni povas fari militon sole pro la purega entuziasmo, simpla amo frateca, militon ne konkiran sed liberigan, kiu celas ne multigon de la teritorio, sed liberigon de la sudslavaj fratoj suferantaj terure pro Turkaj kruelaĵoj. La granda filo de la Rusa nacio Doŝtojevskij entuziasmiĝis. Belege li scias rakonti pri sia pensmaniero: »La granda orienta aglo flugis super mondon briletante per ambaŭ flugiloj sur superecoj de la kristanismo; tiu ĉi aglo ne volas subigi al si la naciojn, ne volas akiri teron, ne volas vastigi limojn, sed li volas liberigi, vekigi la subpremitajn kaj batitajn naciojn, doni al ili novan vivon por bonfarto de ili kaj de la homaro.« Sed neniu en la tiama Eŭropo komprenis. Entrepreni ion, kio ne celas propran profiton, ŝajnis al Eŭropo io tiel neordinara kaj tiel kontraŭa al la internaciaj kutimoj, ke la Eŭropo

rigardis la agadon de Rusio ne sole kiel barbarecon de la »malprogresinta, sovaĝa kaj necivilizita« nacio, kapabla ekfari en nia mondo sole pro »maldelikateco kaj malsaĝeco« militon, kiu similas la jam tre longe pasintajn krucmilitojn dum la malluma mezepoko, sed ankaŭ kiel nemo-ralan faron danĝeran al Eŭropo, kiu minacas ĝian altan civilizacion«. Eŭropo ne komprenis tiam la rusan idealon. La angla ŝiparo aperis antaŭ Konstantinoplo. Sed kiam en la jaro 1917 ekparolis kaj ekfaris Miljukov, Rodzianko, Lvov, Kerenskij, Lenin, ĉiuj en la mondo komprenis. Kaj kiam en la sama jaro ekparolis Wilson pri la memdestino de la nacioj, eĉ la »internacia« tiama aŭstria ministro pensis, ke decas aplaudi la gloran prezidanton. Certe en la jaro 1877 ne estis la Rusa nacio la plej kultura nacio de la mondo, sed nur en la jaro 1914 aŭdiĝis paroloj de la jaro 1877 el la buŝo de la Anglo Eduard Grey. La mondmilito estis granda ekflamo de naciaj memamoj, sed ĝi devis fini en ligo de reciproke sin estimantaj nacioj. Se la nacioj estimas sin reciproke, ili ankaŭ amos sin reciproke, ĉar ĉiu amo homa bazas en estimo. Ankaŭ la amo inter nacioj. Neniu amo estas facila, kaj plej malfacile estas ami la propran nacion per la bona amo. Car tia amo devas esti amo krea, la plej granda celado spirita, la plej grandaj postuloj de la nacio dum la plej firma fido al ĝi.

FELIETONO

B. TITTL:

MEMOROJ EL LA DUMMILITA TEMPO. (Fino.)

La kunvoko de la parlamento enportis en la politikan vivon de Aŭstrio iom da freŝa aero kaj tial oni komencis spiri pli libere. La subpremo ne ĉesis tute, okazis ja ankoraŭ multaj tragedioj, sed ĝenerale ni sentis, ke la fino ne plu estas malproksima.

Estis demando, kiel kondukti en la parlamento niaj deputitoj: ĉu ili kaŝu tie la ĝeneralan sopiron de la nacio pri sendependeco, aŭ ili esprimu klare kaj energie la postulon de libereco, la redonon de niaj historiaj rajtoj. Estis malfacile konkludi ĉu niaj deputitoj en tiu grava problemo estos unuecaj. Kaj tiam ekparolis niaj verkistoj — iniciatitaj de nia Majstro Jirásek, kies sepdekan naskiĝtagon antaŭnelonge festis la nacio tiel brile — per sia flama manifesto, kiu delikate prezentis la sentojn de la tuta nacio: La bohemiaj deputitoj ne timu la eblan persekuton, sed pere de la parlamento ili malkaŝu al la ekstera mondo, ke nia nacio tute konsentas kun la agado de niaj eksterlandaj revoluciuloj gvidataj de Masaryk kaj Beneš, kaj por atingi la celon ĝi estas preta uzi ĉiujn eblajn rimedojn.

„Sed ekzistas ankoraŭ komuno pli alta ol estas komuno de la nacio. Ĉi estas la homaro. Sed ni ne sentas ankoraŭ tiun komumon tiel profunde, kiel komumon de la nacio. Ni ne sentas ideon de la homaro tiel arde, kiel sentis ĝin ekzemple Auguste Comte, kiu sciis preĝi al ĝi kaj honori ĝin kiel la plej superan Altan Estecon per sia tuta vivo. Ni ankoraŭ ne sentas la homaron kiel organizitan tuton. Sed ju pli kreskas amo de nia propra nacio, ju pli ni kredas je niaj naciaj idealoj, des pli intensive ni estimas ankoraŭ la fremdan nacion.

Car komprenante bone, kio estas la plej alta celo de nia propra nacio, ni trovas, ke la plej sankta idealo de la nacio fremda estas la samo kaj samtempe malsamo. Ni konsciiĝas la plej profundan komunecon de ĉiu vero: ĝi estas la relativeco de ĉiuj veroj, senabsolutesco de ĉia absoluto, homa origino de ĉiu postulaĵo morala, sociala, religia, scienca. Se tio konsciiĝas la homo lernas kompreni ĉiun homon, la nacio lernas kompreni ĉiun nacion. Kompreni signifas pardoni, precipe inter nacioj. Tiel la malpacoj inter nacioj malaperas.

Oni vidas, ke la skizita pensaro, plena de noetika skeptikismo, rezultas en pozitivisma optimismo. Ne kontraŭstari la malbonon, sed ami la bonon kaj malbonon ekskluzive tial, ĉar ambaŭ ekzistas. Eĉ la nihilisma glora sentenco de Tolstoj havas sintezan valoron. Car ĉion, kio estas, estas necese ami simple pri tio, ĉar ĝi ekzistas.

Kaj tiel komenciĝis la fama periodo de la laboro de niaj deputitoj en la aŭstria parlamento antaŭ la fino de la milito.

En tiu tempo, ni, esperantistoj en Plzeň, eksentis, ke estas necese unuigi la reston de bohema esperantistaro kaj prepariĝi al la postmilita laboro. En la esp. klubo de Plzeň, kies dummilita vivo estis eksterordinare vigla, mi prezentis proponon elserĉi la restintajn esperantistojn kaj konsiliĝi kun ili pri reapero de esp. gazeto. Mia propono estis akceptita kaj la komitato ŝarĝis min per la tasko komenci tiucelan laboron. Mi konfesas, ke la laboro tiam ne estis facila. Al mi estis konataj la adresoj nur de nemultaj boh. esperantistoj kaj mi sciis, ke mi devas streĉi ĉiujn fortojn, se mi volas atingi sukceson. Nu, kaj la peno estis kronita per sukceso: samideanoj, plenaj de revekiganta entuziasmo helpis, kiel ili povis. Ili sendadis adresojn kaj propagandis en siaj rondoj. Jen mi devas ĉefe mencii la helpon de f-ino Šupichová kaj de s-o Kudela en Olomouc.

Post sukcesintaj antaŭlaboroj ni kunvokis al Praha (15. XII. 1917) konferencon de boh. esp., kiu decidis eldoni »La Progreson« kaj samtempe elektis min ĝia redaktoro. Laŭ la decido la unua numero devis aperi jam en sekvinta monato. Sed la presejo en Plzeň ne havis esp. tipojn kaj la fabriko ne liveris ilin ĝustatempe.

LITERATURO

KRISTNASKO.

Rememoro el junaĝo. Skribis Marie Majerová.

Tiam la Kristnasko ne estis blanka, plena de poezio kaj brilanta neĝo. Densa mallumo vualis la tutan pejzaĝon per grizaj nuboj, kiujn tie ĉi kaj tie traŝidaris hela, flagranta flamo, aŭ bukado da fajreroj...

Tutan longan vojon el la lernejo ni havis en senfunda koto, kaj la frosto kaj malseko trafenetris min kaŭze de la delikata, malvarma pluvo ĝis la koro. Fine mi alvenis al metalfandejoj. La vojo estis tie ĉi seka, surŝutita per pulvorigita metalskorio. Kaj tie, en la fino de tiu longa aleo da mizere senfoliaj robinoj estas jam »la malnova stacio«, estas jam hejmo. Kiel malgajaj estis tiuj robinoj kun stranga ornamo de metalfandeja fumo; ili staris ĉi tie kiel maljunaj, nudaj almozuloj sur malespera, dezerta vojeto.

Malfirmiĝinta ligna ŝtuparo angora ekĝemis sub miaj infanpiedoj. En kuirejo bonvenigis min tiu sama mallumeco, kiu regis sur la ŝtuparo. Tie ĉi estis malvarme kaj malbonodoris ĉi tie la bulbo kaj vindotukoj... ĉar antaŭ unu monato mi ricevis tian malgrandan fratineton. Tiame la patrino tiel ploris! — — Mi ploris an-

Tial la unuaj ses numeroj estis presitaj en Praha. Mi memoras mian tiaman »suferon«: La politikaj oficoj permesis eldoni »La Progreson« kondiĉe, ke mi prezentos al la cenzuro ne nur la aperantajn numerojn, sed ankaŭ laŭvortan boheman tradukon. El Praha mi ricevadis la cenzurnumerojn vespere. Mi sidiĝis al skribmaŝino kaj tradukis la deksepaĝajn numerojn ĝis la oka matene. Tiam mi tuj iris al cenzuristo por prezenti al li la cenzurnumerojn kaj la tradukon. Spirite eĉ korpe tute elĉerpita mi poste enlitiĝis. —

Dume la militokazintaĵoj rapide fluis. Sur okecidento la francaj, anglaj, belgaj kaj amerikaj armeoj vigle puŝis germanajn soldatojn el la franca teritorio. Estis videble, ke la militfeliĉo klinas sin daŭre al la ententaj trupoj. Estis demando, kiel longe ĝi ankoraŭ daŭros.

Venis oktobro 1918. La 25. matene mi renkontis konatulon, kies ridanta vizaĝo jam de malproksime montris ĝojon. »Ĉu vi jam scias pri Bulgaroj?« — li demandis min, kaj li komencis rakonti pri la kapitulacio de bulgara armeo. »Ni tion festis ĝis la kvara matene!« — li flustris en mian orejon kaj premante mian manon, li forkuris. Post la konstato de vereco de lia sciigo mi ekĝojis. La espero, ke la fino venas, min ĝojigis...

Forpasis tri tagoj, venis 28. oktobro. Antaŭ la tagmezo la telegrafaj raportoj anoncis, ke

kaŭ, ne sciante kial. La patro staris apud la fenestro kaj diris eĉ ne unu vorton... Li estis tiutempe preskaŭ tri monatojn sen laboro kaj nur antaŭ unu semajno li fariĝis nokta gardisto de ŝtalmagazenoj en metalfandejoj.

Mi demetis tramalsekiĝintajn ŝuojn kaj vestaĵon en malluma kuirejo, neniu zorgis pri mi. Poste mi senbrue malfermis pordon de la ĉambro, kisis patrinon, kaj mi tuj iris al verga lulilo, kie dormis mia malgranda fratino.

Sed la fratinan amon interrompis baldaŭ la sento de malsato.

»Panjo, mi estas tiel malsata!«

La patrino ekĝemetis, kaj tamen ŝi serĉis ie la pankruston kaj forverŝis iom da lakto, difinita por la malgranda.

Mi manĝis kaj varmigis min per tio, ke mi enfosis piedojn en la cindron, ankoraŭ iome varman.

»Panjo, la instruisto rakontis al ni, ke estas kristnaska vespero, ke hodiaŭ venos Kristinfano kaj — — panjo, ĉu mi estis ĝentilmora?«

Patrino kapjesis.

»Do, li venos ankaŭ al mi kaj alportos arbeton, pomojn kaj tukon, vi scias, min frostas tiom la oreloj kiam mi iras el la ernejo —, kaj eble alportos ankaŭ nuks-

Aŭstrio submetiĝas. Kion elvokis tiu sciigo en nia nacio, tio ne estas priskribebla. Ĉie estis senprokraste elmetitaj flagoj en koloroj de nia nacio kaj de ĉiuj ententŝtatoj, ĉiuj fenestroj estis ornamitaj tiel, ke la stratoj faris neniam antaŭe vekitan impreson. Stratoj estis plene ĝajne de popolamaso, la personoj al si reciproke nekonataj kisis sin kaj ĉirkaŭprenis, soldatoj forjetadis insignojn de imperiestro de siaj uniformoj kaj ornamis sin per naciaj kokardoj, aŭstriaĵoj (emblemoj) estis deŝirataj de ŝtataj konstruaĵoj kaj dum kantado de la nacia ĉeĥa himno, ĵetataj en riverojn, policanoj demetis siajn sabrojn por montri, ke ili sentas sin samaj civitanoj de la libera ŝtato kiel civiluloj kaj en la stratoj aperis nacia gvardio: sokoloj kaj membroj de laboristaj asocioj gimnastikistaj. Neniu fremdulo estis atakata, ĉio estis farita en senekzempla ordo kaj harmonio. Kaj komencis regi la Revolucia Nacia Komitato...

Tiel naskiĝis libera Respubliko Ĉeĥoslovakia...

Vivu ŝtato kara, en suferoj naskita kaj ne mortu! Viaj nacioj estu viaj infanoj. Ili amu sin reciproke kaj harmonie kunlaboru por sia propra kaj por via bonstato!

ojn kaj sukeraĵojn — —, panjo, kial vi ploras?»

La patrino sidis ĉe la lulilo kaj grandaj larmoj falis sur kuseneton de la fratino.

»Panjo, ne ploru, mi petas vin!« mi petegis ŝin, tute mirigita kaj timigita, prenante patrinon ĉirkaŭ la kolo.

Poste mi silentiĝis, ĉar patrino ne respondis. La patro gardis ŝtalmagazenojn, malproksime en kampoj, tute je fino de la metalfandejoj, post »la malnova stacio,« kie ni loĝis. Kaj la ŝtato el tiu ĉi metalfandejo havis ĉiam ĉe malnovajistoj la plej bonan valoron.

La ĉambro malrapide malvarmiĝis, kaj mi, kiam mi vane atendis Kristinfanon, iris fine dormi. Diferencaj sonĝoj kaj fantazioj ekregis min duone dormantan kaj duone maldormantan. Poste tamen nur la lacigo venkis kaj mi ekdormis.

Tiel noktmeze, eble ankaŭ ke pli frue, vekis min la bato. Kvazaŭ najbare de mio falis. Mi elsaltis ektimigita kaj mi vidas patrinon, kiel ŝi serĉas kaj ligas sian subjupon kaj duonvestita kuras eksteren.

Mi komprenis nenion. La malgranda en lulilo vekiĝis kaj komencis krii. Mi prenis ŝin en la liton, kaj ne sciante kiamaniere ŝin trankviligi mi ploris ankaŭ.

Patrino ne restis ekstere pli longe, ol unu horon, sed por mi estis tiu tempo kiel eterno. Mi sidis sur litflankaĵo kaj puŝadis al malgranda krianta fratino fingron post fingro en la buŝeton, balancis ŝin sur genuoj, sed malgranda kriulo ne trankviliĝis. Lacita kaj malespera per vana klopodo, mi laŭte ĝemis kaj tiel ploregis, ke la domhundo komencis ululi.

Fine la ŝtuparo ekknaris; la patrino revenis. — Kaj al ŝi apogita, paŝo post paŝo malfacile iris la patro. Li estis vundita per kuglo el revolvero.

Stelistoj kaŝiĝis dum la tago en magazeno kaj la patro trovis ilin nokte en plej diligenta laboro — kaj unu el ili donacis al li kuglon el revolvero, belegan kristnaskan donacon, unusolan en nia familio..

Tradukis Václav Jakubův.

ooo

AVERTU.

«Esperanto», oficiala organo de Universala Esperanto Asocio en Genève. Oni povas aboni 1/2 s-o Frant. Kavan, administracio de »La Progreso«, Plzeň. Abono Kč 45.—. Membreco de U. E. A. Kč 25.—. Membreco kaj abono Kč 65.—.

DIVERSAĴOJ

La VIII. laborkunsido de Orientbohemiaj esperantistoj okazis la 11. de decembro 1921 en la restoracio »Sůva« en Chrudim. Partoprenis 33 personoj (el kiuj 5 gastoj el Praha nome: s-oj Hromada, Adámek, Pitlík kaj ges-oj Kander). Antaŭtagmeze oni vizitis muzeon kaj urbon, posttagmeze je la 2. malfermis la laborkunsidon s-o financa ĉefkonsilanto Gallat, proponinte kiel prezidantinojn »ŝian reĝinan moŝton« Keyzlarová, vicprez. Čermák, protokoliston s-on Daniel. Post la aplaŭda akcepto s-o Sklenčka raportis pri la regiona movado. S-o Pitlík raportante pri la morala kaj financa sukceso de la XIII. Univ. kongreso de Esperanto en Praha, bedaŭris, ke la organizintoj -en Pardubice, pridiskutinte la XIIIan ne sciigis la laborkunsidan programon al la Loka Kongresa Komitato, kiu certe estus sendinta delegiton al la VII. laborkunsido en Pardubice. S-o Pitlík sciigis, ke la aranĝado de la ekskurso al Moravia Kras post interkonsento estis transdonita al Vojaĝ- kaj transportoficejo »Čedok« (vojaĝo vagonara), Turisma Asocio en Brno kaj s-o d-ro Barviř, kiu interrilatiĝis kun L. K. K. en la nomo de la esperantistoj en Brno (vojaĝo el Blansko al Macocha kaj vizito de la grotoj). Kaŭzoj de la nesukceso de la ekskurso estis: malfruigo de la vagonaro kaj d-ro Barviř, kiu preninte sur sin la taskon, ne veturis kun la speciala vagonaro, kio kaŭzis haŭson kaj neinformecon de la partoprenantoj. S-o Pitlík proklamas sian artikolon pri Mor. Kras en n-o 50 de »Esper. Triumfonta« vera kaj bedaŭras, ke s-o d-ro Barviř penas forkuri de la respondeco, kiu kiel per liaj intervenoj ĉe la ĝenerala sekr. kaj liaj leteroj, tiel per ofic. dokumentoj de la Turisma Asocio estas facile provebla. S-o Pitlík deziras, ke la laborkunsidoj de orientbohemiaj esp. restu en personaj aferoj neŭtralaj, konservante la bonan reputacion de la siatempaj orientbohemiaj kunsidoj sub gvidado de d-ro Sulhof kaj gardante unualoke ekminacatan unuecon de la ĉefaj esp. — S-o Hromada raportas pri propraj laboroj por la ŝtata ĉeĥoslovaka esp. kongreso en j. 1922, la fondota propaganda sekcio ĉe la Ĉeĥosl. Esp. Asocio kaj novaĵoj en la esp. movado. — S-o Berger, aludante la parolojn de s-oj Pitlík kaj Hromada, rekomendas al Ĉ. E. A. publike preparoli la neĝentilan raporton de s-o Eleršiek. red. de »Esperanto Praktiko«, pri la XIII. en Praha, kiu nepovinte malhelpi la okazigon de la XIII. en Praha, kalumnias ĝian urbestaron, loĝantaron, ĉeĥosl. nacian kulturon, kaj ŝtaton. (Akceptita.) S-o B. demandas, kial ne anernis depost marto eldonaĵo de s-o Bouška »Ŝkola esperanta«, por kiu oni kolektis abonon. — S-o Gallat parolas pri organizo loka, regiona, landa kaj internacia: s-o Poppe pri la historio de Finnlando, lando de la XIVa. — S-o Sklenčka raportas pri la sukcesa poresperanta interveno de s-o Couzon ĉe la komerca ĉambro en Hradec Králové: s-o Hromada invitas al ĝenerala kunveno de la Ĉ. E. A., okazonta dum januaro en Praha, kie eble samtempe okazos la regiona kunveno de centra

Bohemio. — La IX. laborkunsido oni decidis laŭ proponoj de s-oj Poppe kaj Čermák aranĝi en Česká Třebová dimanĉe la 5. de marto 1922. Por blindula preso estis kolektite 60 Kč. — B.

Ce la ŝtata ekzamena komisiono por ĉefaj elementaj kaj burĝaj lernejoj en Praha okazis la unua ekzameno pri esperanto la 8. de novembro 1921. Submetis sin al tiu ekzameno kvin kandidatoj sinjoroj: Jan Mašek, paroĥestro; Ant. Ráž, Jos. Rys, Frant. Švinger, instruistoj, kaj s-o Jan Novotný. Ĉiuj kvin kandidatoj estis aprobitaj, du kun eminenta sukceso. —

I. Regiona kunveno de okcidentbohemiaj esperantistoj okazis dimanĉe 18an dec. en la »Popola scenejo« de Laborista domo en Plzeň. Prezidis ing. Novák, prez. de Esp. klubo Plzeň. Partoprenis esp. de la tuta regiono tiel multnombre, ke la granda halo estis plene. Estis decidite aranĝi la »Kunvenojn« ĉiutrimonate kaj kiel komitato por ilia aranĝo estis elektitaj: ing. Novák, J. Přibáň, B. Tittl, J. Kaiser, Fr. Kavan, J. Pešek kaj por la germanaj esp. societoj en la regiono (deleg. sendis 3 germ. soc.: du el Plzeň kaj unu el Stodo) s-o Dolanský. Post raportoj de s-o A. Pitlík el Praha pri la regionaj kunvenoj kaj pri la XIII. kongreso le ĉeestantoj unuanime decidis esprimi dankon al la aranĝintoj de la XIII., ĉefe al s-o Pitlík pro ilia mirinda laboro kaj rifuzis ĉiujn atakojn faritajn kontraŭ ili. Germ. deputito s-o Dolanský esprimis bedaŭron pro senkaŭzaj kontraŭĉefaj atakoj de s-o Ellersiek, red. de Esp. Praktiko. La elektita komitato decidis pri la tempo kaj loko de la sekvonta kunveno.

Esp. inter blinduloj. La Ia internacia kongreso de blinduloj-esperantistoj influigis efike nialandan interblindulan esperantan movadon. Dum oktobro 1921 oni malfermis en blindulejo de »Klár« tri kursojn, du por komencantoj, unu por progresintoj (instruas f-ino Vlčková, s-oj Macan kaj Tutsch). Post informiga parolado de prof. Stejskal estis en blindulejo »Deylovna« malfermita kurso, kiun partoprenas 26 blindaj geknaboj (instruas f-ino Stejskalová). En proksima tempo oni presigos esper. vortarojn por blinduloj. Ankaŭ esperantaj paroladoj, kiuj havis dum la kongreso la fremdaj nevidantaj gastoj (pri stato de blindula movado en ilia lando) estos presigitaj en reliefa sistemo. Oni faris ankaŭ preparajn laborojn por fondi »Asocion de ĉeosl. nevidantaj esperantistoj«, kies organo estus »Auroro«, nuna esperanta aldonajo de bohema reliefe presita gazeto »Zora«.

2. Komitata kunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista. Ĝi okazis la 1. de novembro 1921 en kafejo Edison. Partoprenis: S-oj Eiselt, Dr. Kamaryt, Hromada, Novák, Pech, Pitlík kaj f-ino Vlčková, kiu protokolis. S-o Hromada skizas la okazintaĵojn de la lasta tempo: Dekreto de ministerio de instruado, laŭ kiu en 1921/2 estos permesata instruado de esp., se aliĝos laŭleĝa nombro de lernantoj kaj se estos instruistoj. Tiam la direkto de resp. lernejo devis antaŭe fino de junio 1921 sciigi la ministerion pri tio, sendi planon de instruado kaj indiki, kiel la instruonto akiris kapablecon. Ĉar D-ro Kamaryt interkonsentis kun la respektiva referento en la ministerio, ke intertempe

la atesto de Asocio estos konsiderata kiel pruvo de kapableco, tiaj atestoj estis donitaj al kelkaj petintoj. Ĉar la dekreto estis intimita (oficiale sciigita) sole al Landa konsilantaro lerneja de Bohemio, Asocio sendis al la ministerio petskribon, ke ankaŭ Landa konsilantaro lerneja de Moravio kaj Lerneja fako en Slovakio estus sciigitaj pri ĝi. Ĉar ne ĉie la direktoroj bone komprenis la dekreton (rilate la templimon: fino de lerneja jaro 1920/21) D-ro Kamaryt havigis klarigon, ke ankoraŭ nun la direktoroj povas proponi instruadon de Esp. en siaj lernejoj. Sekve de plendo de s-o Čermák, prof. en Ústí n. O. D-ro Kamaryt intervenis ĉe la ministerio, ricevis klarigon, ke en la faka lernejo teksista en Ústí n. O. ne estis permesita pro troa ŝarĝiteco de la lernantoj, ne pro principaj motivoj, kaj plue promeson, ke en la superaj industriaj lernejoj Esp. estos permesita. Sekve de plendo de s-o Horáček el Kutná Hora koncerne la instruistan pedagogion en Kutná Hora, Asocio dufoje petis, ke la ministerio deklaru, ke la dekreto rilatas ankaŭ pedagogiojn. Post interveno de s-o Eiselt favora decido estis ricevita. Ŝtata ekzamena komisiono por Esp. (komisaro s-o Eiselt) funkcios la 8. XI. Raporto de la kasisto. Asocio havas 16 klubojn, 107 izolulojn, entute 768 pagintaj membroj, ĉiuj 921. Anstataŭ membrokarto por 1922 la malnovaj membroj ricevos banderolon algluotan sur la membrokarton 1921 (laŭ uzo de UEA.). Estos eldonita flugfolio pri Asocio kun administraj informoj. Sekvis debato pri Komercaj akademioj kaj Lingvo internacia. Estis akceptitaj diversaj decidoj. Asocio atentigas la Ĉsl. Ruĝan Krucon pri la deziresprimo de la Geneva Konferenco. Estis akceptita propono de s-o Sklenčka (Hradec Král.): Asocio instigas ĉiujn klubojn kaj membrojn, ke ili fariĝu membroj de Ĉsl. Ruĝa Kruco. Kongreso Ĉeĥoslovaka 1922. Ĉiuj ĉeestintaj komitatanoj, plue tiuj, kiuj skribe esprimis sian opinion, proponas kongreson de esp-istoj de ĉiuj nacioj en Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥoj, Germanoj, Magiaroj. Esperable la neĉefaj samideanoj akceptos. Oni skribos al Ligo germana. La VII. laborkunsido proponas Olomouc kiel kongresurbon. Laŭ letero de s-o Kudela, tieaj samideanoj ne konsentas. S-ino Keyzlarová proponas Brno. S-o Kroužil el Brno, opinias tion malfacila. Bratislava proponata de s-o Pech havas malmulte da loĝejoj. S-o Pitlík proponas Pišťany. Oni do skribe traktos pri la loko. Lasta punkto: komitato de favorantoj estis post debato proklamita. Estos eldonitaj diversaj propagandaj flugfolioj, laŭ financaj eblecoj de Asocio. La ĝen.-sekretario opinias ne ĝusta, ke la Asocio — landa organizaĵo — nenion ricevos por propagando el mona profito de la XIII. Oni esprimis esperon, ke la presaj propagandaj eldonos lokaj kluboj de Praha, kiuj partoprenas je la profito. Laŭ propono de E. klubo en Plzeň Asocio skribe intervenis ĉe Ministerio de poŝtoj pri respondkuponoj. Laŭ propono de Labora kunsido en Pardubice Komitato instigas samideanojn en aliaj regionoj aranĝi similajn kunvenojn kiel la orientbohemiaj. Informojn donas s-o Sklenčka O. en Hradec Král., Živnobanka. Rud. Hromada.

S-o J. H. Fazel havas ĉe Asocio leteron el Londono.

S-ino Jožka Schülerová havas ĉe Asocio leteron el Hastings.

S-ro Klaus en Praha, kiu klopodis je la reĥmigo de militkaptitoj en Rusujo kaj antaŭnelonge revenis el Siberio, bonvolu sciigi sian adreson al Ĉ. Asocio Esp., Praha VII., Sochařská 333.

Olomouc. En oktobro estis malfermitaj esp. kursoj en Popola Universitato kun 20 k., en Hodolany kun 42 p., kiujn gvidas s-o Neužil. La 7. XI. estis de la ŝtata ekzamena komisiono en Brno ekzamenata s-o Alb. Neužil, lernejestro en Vl.-Neředín, kiu faris la instruistan ekzamenon pri Esp. kun tre bona sukceso. La 12. XI. vizitis nian urbon s-o Leop. vizito en komerca ĉambro k. ĉe kelkaj firmoj konvinkis la vizitantojn pri utileco de nia lingvo por internaciaj rilatoj. Interpretis s-o Kudela. Dum vespera kunveno parolis la gasto pri siaj travivaĵoj en Ĉeĥoslovakio.

ooo

La komerca asocio de Rio de Janeiro kaj Esperanto.

La prezidanto de »Brazilia Ligo Esperantista« kaj tiu de la Organiza Komitato de la Sesa Brazilia Kongreso de Esperanto sendis al la Komerca Asocio de Rio de Janeiro, kiu estas samtempe Federacio de la Brazilaj Komercaj Asocioj, raporton pri la nuna stato de la propagando de Esperanto en la tutmonda komercio. Tiu ĉi raporto estis legata en ĝia lasta kunsido, okazinta la 11-an de l'nuna monato, kaj la Komerca Asocio unuanime aprobis la jenan gravan deziresprimon: »La Komercio de Rio de Janeiro, certa, ke la helpa lingvo Esperanto, kies realigebleco estas praktike kaj tutmonde pruvita, povas fari kaj jam faras grandajn servojn al la komercaj rilatoj inter la nacioj, decidis doni al la proksima Sesa Kongreso de Esperanto sian tutan moralan helpon kaj pri tio oni komunikis al Brazilia Ligo Esperantista.« Sroj. Araujo Franco, Affonzo Vizeu, dro. Augusto Ramos kaj J. Diaz Tavares, respektive prezidanto, unua sekretario kaj direktoro de la Komerca Asocio akceptis esti patronoj de la Sesa Brazilia Kongreso de Esperanto.

ooo

Ruzo de la Fontaine. La Fontaine, fama franca fablisto matenmanĝadis ĉiutage kelke da fruktoj. Unufoje li metis sur kamenton unu piron kaj foriris en laborejon. En ĉambron eniris amiko de La Fontaine kaj manĝis la piron. Post kelke da momentoj La Fontaine revenis kaj diris: »Kiu manĝis piron, kiu estis sur kamenton?« »Mi ne manĝis ĝin,« diris amiko de La Fontaine. »Bone, mi jam timis,« diris La F. »Kiukaŭze?« »Mi donis iom da arseniko en ĝin. Mi volis veneni ratojn.« »Ho vel, mi estas venenita,« ekkriis la amiko »donu al mi rapide

kontraŭvenenon!« »Trankviliĝu, amiko,« diris La F., »mi volis ekscii, kiu manĝis mian piron.«
(El franca lingvo tradukis Riedl.)

BIBLIOGRAFIO

En nia movado estas rimarkinda fakto tre ĝojjiga: al literaturo, kiu en la vivo de la nacioj prezentas nivelon de ĝia kultura vivo kaj kiu por esperantistoj havas speciale gravan signifon, ĉar ĝi estas kvazaŭ spegulo de la disvolviĝo de la movado, estis en la lasta tempo riĉigita ne nur laŭ la kvantito, sed eĉ laŭ la kvalito. Kaj tiu ĉi fakto certe ekĝojos ĉiun amikon de nia movado. El la verkoj ricevitaj ni mencias:

William Shakespeare: *Song'o de Somero meza Nokto*. Tradukita de Luise Briggs kaj eldonita de la Brita Literatura kaj Debata Societo per helpo de »Fund for the Encouragement of the Translation of English Literature into Esperanto« (Fondo por kuraĝigi la tradukadon de angla literaturo en Esp.) Vendas: Brita Esp. Asocio, London, W. C. 17, Hart Street. Prezo ne montrita. — Jen bonega traduko de eminenta ĉefverko de Shakespeare, kiu ne povas manki en biblioteko de kiu ajn esp. societo eĉ de ĉiu vera esperantisto.

K. Osaka: *Perloj el la Oriento*. Tradukoj el japanaj kaj finaj klasikaj verkoj. Dua serio, n-o 1. de la Japana esp. Biblioteko. Ricevebla ĉe: Esp. eldonejo Nippon Esperanto-Sya, Tokyo, Kanda-ku, Omotesarugakutyo 2. Prezo 0.50 Yen. — Jen vere interesaj tradukaĵoj de japanaj kaj finaj legendoj kaj poemoj.

Heinrich Heine: *Elektitaj poemoj*. Tradukitaj de Fr. Pillath. Aperis en la Nova Esp. Biblioteko de Esperanto-Verlag, Fr. Elersiek, Berlin S. 59. Prezo 3.— M. plus 35%. Pri la tradukaĵoj oni povas diri, ke ili eĉ ne iom egalas la originalajn poemojn de la eminenta poeto. Tial ni miras, ke ili atingis sian duan eldonon.

Mabel Wagnalls: *La rozujo ĉiumiljara*. Tradukita de Edw. S. Payson, prezid. de Esp. Asocio de Norda Ameriko. Kun bildoj de la aŭtorino kaj de la tradukinto. Prezo 35 cendoj. — La belaspekta broŝuro en bona esp. stilo prezentas al la legantoj historion tre interesan. Tial ĝi meritas rekomendon.

Arthur Azevedo: *Amo per proverboj*. Trad. el portugala lingvo de A. C. Fernandez. Unuakta komedio. Eld. O. Ziegler & Co. Marktrewitz, Bavario. Prezo 3 respondkuponoj.

Prof. Dr. J. Novák: *Jan Amos Komenský* (J. A. Comenius). Trad. kaj eld. *Rondeto de Esperantistinoj en Praha*. Aĉetebla por 5.40 Kč ĉe f-ino K. Hlaváčová, Praha-Smíchov, Jungmanova 6. Kun bildo de Comenius. Antaŭparolo de D-ro St. Kamaryt. — La broŝuro tre interese priskribas la malfeliĉan vivon kaj la admirindan laboron de la ĉeĥa ekzilito nomata »instruisto de la nacioj«. Ĝi ne povas manki en biblioteko de klera esperantisto.

Jiří Mahen: *La koboldo Ondra*. Tradukita de la Esp. Rondeto de Moraviaj Esp. Pioniroj. Prezo ne montrita. Al la eldonintoj kaj tradukintoj oni povas gratuli pro du kaŭzoj: La arango de la broŝuro estas vere mo-

derna kaj bela, enhavo interesa, rakontata per stilo senerara kaj facile komprenebla eĉ de komencantoj.

Dr. Heinrich Hofmann: *La Struvel-petro*. Trad. J. D. Applebaum, eldonis Literatura instituto Rütten & Loening, Frankfurt a M. Prezo 18 M. — Jen porinfana libro kun multaj bele koloritaj bildoj kaj lerte tradukitaj versaĵoj de eduka enhavo. Ni rekomendas ĝin kiel donacon al infanoj.

V. Zielinski: *Eŭropo Unuigita*. (Skizo de praktika programo pacifista). Teksto esp. franca. Eldonita de la aŭtoro. Adreso: Constantinople, Galata, Panteleimon Han. (Turkio). Prezo 2 fr. Frankoj. Bonega broŝuro pritraktanta la metodojn gvidatajn al ĝenerala internacia paciĝo.

T. J. Guéritte: *Esperanto, mezinár. jazyk inženýrů*. Předneseno ve spolku inž. v Londýně. Přel. prof. inž. Vinc. Kroužil v Brně. Brožura předvádí nejen autorovu přednášku, ale i po ní následující diskusi. Doporučujeme ji nejen jako výtečnou prop. pomůcku v kruzích čs. inženýrů, ale i všem, kdož chtějí uspořádat přednášku o Esp.

Zamenhofův základní kurs Esperanta. Levná učebnice Esp. (stojí 1 Kč!), sestavená dle Zamenhofova »Fundamento de Esp.« ve formě časopisu, velikosti našeho listu. Se slovníčkem esp.-českým a českými překlady jednotlivých cvičení. Zasilá: R. A. Čech, Vídeň, IX. D' Orsaystr. 7. Doporučujeme jako levnou pomůcku pro kursy.

Josef Süßer: *Die Völkersprache Esperanto*. Vollständiges Lehrbuch nebst Übungs- und Leseteil. Mit Ministerialerlass vom 26. Juli 1921 zum Unterrichtsgebrauche an Mittelschulen mit deutscher Unterrichtssprache sowie an deutschen Bürgerschulen in Čechoslovakien allgemein zulässig erklärt. In Kommission bei J. Kern, Buchhandlung, Saaz. Preis 9.— Kč. — Sehr gutes und praktisch verfasstes Lehrbuch, da schon von den ersten Lektionen an ist auf die Praxis besondere Rücksicht genommen. B. T.

o o o o

Voĉo el ĉeĥoslovaka lernejo.

En Vídeň (Wien — Vieno) ekzistas tiutempe 29 ĉefaj lernejoj, enhavantaj 140 klasoj. Ĉirkaŭ 6200 ĉefaj infanoj estas en ili instruataj en ĉefa lingvo. Krom tio la helpa societo »Comenius« zorgas ankoraŭ pri 1500 infanoj de ĉefnacieco, kiuj stas en 34 klasoj de la diversgradaj lernejoj, nome en 3 popolaj lernejoj, 1 burĝa, 1 komerca kaj 1 gimnazio. — Entutej eŝpezoj en ĉeĥoslovaka respubliko por ĉefaj lernejoj faras 58%, por germanaj 42%. — Institutoj (ŝtataj) por la edukado de la estontaj instruistoj estas entute 37, el tiu nombro estas 14 germanlingvaj. Ŝtataj fakaj industriaj lernejoj estas 16 ĉefaj kaj 25 germanlingvaj.

J. Šupichová.

♥

KORESPONDADO.

Italujo. Milano XXXI. Via Ponte Seveso 50. S-o Pietro Giolo dez. kor. kun ĉiulandaj gesamideanoj, precipe kun fraŭlinoj; intŝ. P. M., broŝurojn, gazetojn, portretojn, leterojn kaj il. P. K. bfl.

Habana. Insulo Kuba, str. Prado 61, s-o Jozefo Benagez dez. kor. kun ĉiulandaj gesamideanoj, precipe kun fraŭlinoj pri homamo; ĉiu alia bonvole elektu mem la temon; interŝ. P. M., I. K., L. bfl.

Ĉeĥoslovakio. Liberec, s-o J. Janák, serĝento ĉs. děl. st. odd. 253; intŝ. I. K. kaj L.

Ĉeĥoslovakio. Slavoňov apud Nové Město n. Metují. F-ino Manjo Marelová, instruistino, dez. interŝanĝi I. K. kaj Let. kun eksterlandanoj.

.....

ADIAŬ.

Post kvarjara laborado por »La Progreso« mi ĉesas ĝian redaktadon.

Ce tiu ĉi okazo mi sentas la devon danki al ĉiuj kunlaborantoj, kiuj dum mia redaktado per siaj artikoloj helpadis al mi en mia ne tute facila tasko. Ili estis tiel multaj, ke mi ne povas ĉi tie noti iliajn nomojn. Sed mi certe konservos iliajn nomojn en mia animo por ĉiam. Mi premas sincere la manojn al ĉiuj!

B. Tittl.

o o o o

ATENTIGO!

Por gvidado de nia gazeto »La Progreso« en venonta jaro estas starigata redakcia komisiono, konsistanta de s-oj: F. Hahn, In. Gross, J. Kaiser kaj F. Kavan. Leterojn rilatajn al la redakcio oni petas adresi al s-o Frant. Hahn, instruisto, Plzeň, Přemyslova 5o.

KVITANCO.

Por malriĉa studento en Vieno la administracio ricevis jenajn donacojn: Esper. societo en Olomouc Kč 100.—, fervojficistoj Kč 50.—, esp. en Bardijov (A. Helfer) Kč 12.—, Dr. Th. Austerlitz Kč 5.—, Dr. W. Austerlitz Kč 5.—, Engelmann Kč 5.—, V. Nemeč en Karl. Vary Kč 30.—, prof. Kroužil en Brno Kč 50.—, Nekonata en Zlín Kč 10.—, Esp. klubo en Plzeň Kč 43.—, du anglaj studentoj Kč 5.—, sume Kč 320.—. Finnlandano 10.— F. M.

Ĉeĥoslovakoj abonu

bonan, kaj bele ilustritan gazeton »BRATISLAVSKA POŠTA«. gazeto enhavas esperantan anglulon redaktatan de samideanino **Josefina Marečková**, Bratislava, Kopáčská 25. Abonprezo Kč 44.— jare

Ĵus aperis 3. — a eldono de
**BES-a ADRESARO DE ESPERAN-
TISTOJ EL ĈIUJ LANDOJ.**

Bela praktika manlibreto 90-paĝa, kun 1000 adresoj kaj ilustraĵoj. — Prezo 9'— Kĉ, alilande 1'50 Fr. sv., pagebla en poŝtm. au respondk. — Eldonis:

**BOHEMA ESPERANTO-SERVO,
MORAVANY,**

Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo.

**Knihy, jeŝ možno obdržeti
v naŝi administraci,**

pouze proti placení předem, na zaslanou složenku, po objednávce s připočtením porta, jiných knih nevedeme.

- B. Tittl: Slovník esperantsko-český,
vázaný Kĉ 7.50
Slovník esperantsko-český, brož. Kĉ 5.—
Časopis »La Progreso«, roč. 1918 Kĉ 4.50
Časopis »La Progreso«, roč. 1919
Nroj. 5—10 Kĉ 4.—
Časopis »La Progreso«, roč. 1920 Kĉ 16.—
Tittl: Krátká mluvnice Esp. Kĉ 0.30
Čejka: Slovník esp.-čespy, brož. Kĉ 7.80
Čejka: Slovník čes.-esperantský Kĉ 3.30
Čejka-Krumpholz: Malá mluvnice
Esperanta Kĉ 3.10
Šupichová: Esperanto. Slovník a
mluvnice, doporučena minister-
stvem vyučování pro kursy a
samouky. Kĉ 8.80
Novák: Čeŝa literaturo. Kĉ 8.—
Dr. Absolon: Moravia Karsto. Kĉ 7.50
Esp. movado en Moravio Kĉ 4.—
Kamaryt: Úvahy o jaz. mezinár. Kĉ 0.80
Jazyk všeslovanský a Esp. Kĉ 0.20
»O dvojí pravdě« Kĉ 14.—
por niaj abonanto. Kĉ 12.—
Kühnl: Úplná učebnice esperanta:
c) celoplátěná vazba Kĉ 16.40
Kühnl-Procházká: Slovník česko-esper.:
b) brožovaný Kĉ 18.—
Vortoj de Zamenhof, na lepším
papíře Kĉ 6.—
Sherlock Holmes Kĉ 4.50
J. S. Machar: Benedek Kĉ 3.60
Gvidlibro tra Praha Kĉ 3.60
Výtah z Kotzina: Na obranu esper. Kĉ 2.40
Co je esperanto Kĉ —.20
Krestanov: Bulgara lando kaj Popolo Kĉ 20.—
E. Privat: Vivo de Zamenhof Kĉ 48.—
Por kongresaj glumarkoj 100 Kĉ 10.—
Esper. insignoj »U. E. A.« Kĉ 8.—
Esper. insignoj malgrandaj pingloj Kĉ 4.—
Esperanta insigno E. broĉoj Kĉ 5.—

ALIĜU AL U. E. A.!!

Samideanoj el landoj de centra kaj orienta Eŭropo povas aboni

„Hispana Esperantisto“

ĉe so. F. Šilha, Praha II., 460 u Karlova.

La gazeto estas ilustrata, 16 paĝa, kun riĉa kaj interesa enhavo ankaŭ pri Ĉeĥoslovakio. Jara abono 45'— Kĉ.

Dopisnice s obrazem presidenta

T. G. MASARYKA

vydala admin. »La Progreso«

kus 30 hal., 10 kusů 2'70 Kĉ, 100 kusů 24'— Kĉ.

**Via horloĝo funkcios
precize** se vi ĝin donos por
rebonigi al



FR. NOVÁK,
horloĝisto en Praha I.
Malé nám. 10.

Horloĝoj. - Juveloj. - Esp. insignoj de esp. klubo en Praha. - Esp. glumarkoj, kolekto da 12 div. specoj, 100 pecoj Kĉ 4'—, afrankite Kĉ 5'—, 1000 pec. Kĉ 35'—, afrankite Kĉ 37'50.

LA ESPERANTISTO.

ORGANO DE ESPERANTA
UNIVERSITATO POPOLA

Dediĉata al la interna ideo de l' Esperantismo.

Jara abono: 8'— Kĉ.

Redakce:

WIEN II., POSTAMT 34.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.